Chu Fu rerigardas
(Csu Fu visszanéz)

In memoriam T. Gy.

Chu Fu rerigardas
kaj serchas
foliarperdintajn figarbojn
de Drangalag
malnovajn vinberujojn de
sia vinodona vinberejo
sed la estas
jam la estis sole
el siaj bareloj elsekighis
la vino
disfendighis la kristalglaso
che pordo de la kelo
disrompighis la migdalarbo

Chu Fu rerigardas
kaj en la brila spegulo
vidas sin mem
kiel
li trans al la Styxo
mesaghas
kaj kiel per sia piedo
forpushas sian boaton
de la bordo

Chu Fu rerigardas
kaj li jam scias ke
inter
la du orfaj kolonoj
komencas flokfali
la negho

20. XI. 2008

Tradukita de János Ruff